41a PSI



la paska renkontiĝo por la tuta familio

Hellenthal

14 aprilo – 21aprilo 2025

Germanio

printempa semajno internacia

germana esperanto-asocio https://psi.esperanto.de

La PSI-historio

n-ro	jaro	loko	partopre-nantoj		organizantoj
1	1985	Bielefeld	35		fam. Kruse
2	1986	Wetzlar	55		fam. Fischer
3	1987	Rastatt (kun 65-a GEK)	66		fam. Fischer
4	1988	Jünkerath	58		fam. Fischer
5	1989	Hopsten	63		fam. Fischer
6	1990	Todtmoos	72		fam. Fischer
7	1991	Jünkerath	115		fam. Bohr, Loose
8	1992	Bad Neuenahr-Ahrweiler	112		fam. Bohr, Loose
9	1993	Hilders-Oberbernhards	136		fam. Bohr, Loose
10	1994	Jünkerath	144		fam. Bohr, Loose
11	1995	Waldfischbach-Burgalben	111		fam. Bohr, Kruse, Sona
12	1996	Duderstadt (kun 2-a PLI)	136		fam. Bohr, Kruse, Sona, Loose
13	1997	Duderstadt	149		fam. Bohr, Kruse, Sona, Loose
14	1998	Bonn	148		fam. Bohr, Kruse, Sona, Loose
15	1999	St. Andreasberg	159		fam. Bohr, Kruse, Sona
16	2000	St. Andreasberg	161		fam. Bohr, Kruse, Sona, Kranz, Krieghoff
17	2001	St. Andreasberg	160		fam. Bohr, Kruse, Kranz, Krieghoff, Klünder
18	2002	Waldfischbach-Burgalben	169		fam. Bohr, Kruse, Kranz, Krieghoff, Klünder, Gersonde, Böhm
19	2003	Bonn	173		fam. Bohr, Kruse, Kranz, Krieghoff, Klünder, Gersonde, Böhm
20	2004	Duderstadt	132		fam. Bohr, Frense, Gersonde, Klünder, König, Krieghoff
21	2005	Mücke	122		fam. Bohr, Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr, Frense, Gersonde, Klünder, König
22	2006	St. Andreasberg	172		fam. Bohr, Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr, Frense, Gersonde, Klünder
23	2007	Bonn	160		fam. Brücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder
24	2008	Waldfischbach-Burgalben	167		fam. Böhm, Brücker/Sözüer, Frense, Gersonde, Klünder, Rosenstock
25	2009	St. Andreasberg	176		fam. Böhm, Bücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder
26	2010	St. Andreasberg	157		fam. Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder, Rosenstock
27	2011	Waldfischbach-Burgalben	114		fam. Böhm, Brücker/Sözüer, Buhr/Weil, Frense, Gersonde, Klünder, Rosenstock
28	2012	Bonn	120		fam. Buhr/Weil, Dückershoff, Frense, Gersonde, Klünder, Sawitzki
29	2013	St. Andreasberg	78		fam. Bohr, Buhr/Weil, Dückershoff, Frense, Gersonde, Haumer, Klünder, Sawitzki
30	2014	Xanten	97		fam. Buhr/Weil, Diemel, Dückershoff, Frense, Haumer, Klünder, Sawitzki
31	2015	Winterberg	128		fam. Brücker/Sözüer, Diemel, Dückershoff, Haumer, Klünder, Krick, Sawitzki
32	2016	Bad Hersfeld	99		fam. Buhr/Weil, Dückershoff, Haumer, Klünder, Sawitzki
33	2017	Essen	87		fam. Buhr/Weil, Dückershoff, Haumer, Klünder, Sawitzki
34	2018	Plauen	109		fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Sawitzki
35	2019	Hochspeyer	75		fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Krieghoff
36	2020	Wittenberg NULIGITA			fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Krieghoff
37	2021	RETE			fam. Buhr/Weil, Haumer, Klünder, Krieghoff
38	2022	RETE			fam. Buhr/Weil, Haumer, Krieghoff
39	2023	Wittenberg	100		fam. Buhr/Weil, Haumer, Krieghoff
40	2024	Bayreuth	73		fam. Buhr/Weil, Haumer, Krieghoff, Rumrich
41	2025	Hellenthal	78		fam. Buhr/Weil, Haumer, Krieghoff, Rumrich

Bonvenon en Hellenthal

kaj al la 41a PSI

Ĝeneralaj informoj	2
Pri Hellenthal	3
Salonoj/Programeroj	4
Esperanto-kursoj	4
Prelegoj	5-6
Gimnastikoj, Sportoj, Dancoj	6
Kursoj	7
Ludoj	8
Infana programo /Manlaboro	9
Diservoj	10
Ekskursoj antaŭvorto	10-11
Programskemo	12-13
Ekskursoj superrigardo	14-19
Vespera programo	20-21
Listo de partoprenantoj	22
La PSI-Historio	24



Ĝeneralaj informoj

Adreso de la ejo (germanlingve)

Jugendherberge Hellenthal
Erlebnispädagogik-
und Outdoor-Zentrum
Platiß 3 · 53940 Hellenthal
hellenthal.jugendherberge.de/
Tel: +49 2482 12562-0

Telefonnumero

Se vi bezonas helpon de la organiza teamo, vi povas el Germanio senkoste alvoki ĉi-tiun numeron:

0800 3 36 36 36 62

Aŭ rekte alvoku la poŝtelefonon de Ralf H.: **+49 1520 1718060**

La organiza teamo
bezonas helpon dum la PSI
Bonvolu indiki vian
pretecon al ni
DANKON

Organiza teamo

Ralf Haumer
(gvidado, programo, kontraktoj)

Zoja Haumer
(retejo, programo, broŝuro)

Klaus Rumrich
(administrado, financoj, ĉambroj)

Heike Buhr & Georg Weil
(ekskursoj)

Stefan Krieghoff
(konsultado, kontraktoj)

Laura Klünder (retejo)

Nia akceptejo/oficejo

situas en la **ĉambro P1**

kaj estas regule malferma post la manĝoj, sed ankaŭ ofte laŭokaze.
Vi povas pagi tie vian kotizon,
aliĝi al ekskursoj, peti materialon, raporti problemojn ktp.

Manĝoj

08:00 - 09:00 h matenmanĝo
12:00 - 13:00 h tagmanĝo
18:00 - 19:00 h vespermanĝo

Forveturo

Ni petas vin malplenigi kaj forlasi vian ĉambron je la lasta tago ĝis la 10-a horo kaj bonvolu forigi la littolaĵon.

Fumado

Fumado interne estas strikte malpermesita.

Teknikaĵoj

Se vi havas teknikajn bezonojn aŭ demandojn por prelegoj aŭ spontanaj okazoj, bonvolu turni vin al
Ralf Haŭmer.
Prefere anoncu vian bezonon frue, por ke vi certe ĝustatempe ricevu kion vi bezonas.

Trinkejo

Ni ofertas trinkaĵojn kun kaj sen alkoholo. Ili estas disponeblaj/akireblaj de la fridujoj en la junulargastejo. Pagado de konsumo per streko sur la listo kaj pagado ĉe la fino de la renkontiĝo.
La junulargastejo ankaŭ ofertas kafoaŭtomaton kaj aŭtomaton
kun frandaĵoj.

Pri Hellenthal

Hellenthal estas komunumo en Germanio. Ĝi troviĝas en la distrikto Euskirchen de la federacia lando Nordrejn-Vestfalio.

La plej frua skriba mencio estas de 1260 kaj legas "Hellindale". La nomo iras reen al malnovaltgermana „hellan“ (sono, sonoro) kaj ĝermana „dalą“ (valo).

La signifo 'sonanta valo' povas esti klarigita per la eĥoefiko de la valo aŭ la ferprilaborado.

En 1794, kun la invado de la francaj revoluciaj trupoj, la antaŭa feŭda regado en la regiono finiĝis. Kun la formado de la kantonoj de Reifferscheid, Kronenburg kaj Schleiden kaj la Mairien estis establita nova politika strukturo.

Programo

La programo sekvas la tradician skemon:
- antaŭtagmeze: labora programo
- posttagmeze: ekskursoj
- vespere: distra/kultura programo

Krom la fiksita programo okazas diversaj laŭokazaj rondoj kaj programeroj. Se vi mem deziras aldoni programeron, simple anoncu tion al la organizantoj. La aktualan programon vi ekscios el la reto kaj de la ĉiutagaj afiŝoj ĉe la enirejo.

Spontanaj rondoj

Se vi sentas la bezonon iniciati iun programeron ekster la skribita programo, ekzemple ludon, muzikan rondon, kantgrupon ktp., bonvolu turni vin al la organizantoj. Laŭeble ni havigos al vi salonon por via programero.

La junulargastejo ankaŭ volonte prunte donos al vi diversajn ludojn kaj aliajn ilojn.

Libroservo

salono Manscheid
La libroservo de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL) estas malfermita ĉiutage.
Prizorgas ĝin
Gerd Jacques



En 1819, post mallonga epizodo de la Mecklenburg-Strelitz, la Regno de Prusio transprenis la municipan areon.

Ekde la Traktato de Versajlo de la 28-a de junio la municipo Hellenthal limas okcidente kun la Reĝlando de Belgio je longeco de 17 km.

En decembro 1944, la Okcidenta Fronto pasis tra la areo de la hodiaŭa municipo. La 16-an de decembro, la Germana Armeo komencis la Batalon de Ardenoj, sed ĝi kolapsis post nur kelkaj semajnoj pro manko de soldatoj, materialo kaj la supereco de la Aliancanoj.

Fine de decembro 2022 la komunumo havis 7925 loĝantojn.

Salonoj / Programeroj

etaĝo	ĉambro-nomo	mal-longigo	7:30-8:00	9:00-10:20	10:35-12:00	13:00-18:00	19:00-20:00	20:00-22:00
ter-etaĝo	Giescheid	GS		prelegoj, kursoj	prelegoj			
ter-etaĝo	Ramscheid	RS						
ter-etaĝo	Manscheid	MaS	—	libroservo		—	libroservo	—
ter-etaĝo	Dicker-scheid	DS	—	manlaboro			—	—
ter-etaĝo	Wittscheid	WS	matena laŭdo	E1-esperanto-kurso	E2-paroliga-rondo			
subter-etaĝo	Mischeid	MiS	jogo	sporto	zumba			
subter-etaĝo	Zingscheid	ZS		musika rondo	ludoj musiko, k.t.p.			vespera programo
subter-etaĝo	Kamin-zimmer	KZ		mazi			pĵam-rakonto	
1. etaĝo	oficejo	**P1**	laboras	post la manĝoj				

Esperanto-kursoj

E1 Kurso por Komencantoj

Alex Humet
salono Wittscheid
ĉiutage 9:00-10:20

Alex Humet, kataluno kiu loĝas en Belgio de pli ol kvar jardekoj, estas instruisto de Esperanto ekde 1986. En PSI li denove uzos la BEK-metodon (de la usona instruisto Dennis Keefe), kiu tre efike alproprigas la lingvon al komencantoj. La kono de la lingvo kreskas kiel neĝbulo ĉe la gelernantoj, kiuj daŭre uzas la novajn konceptojn, vortojn kaj esprimojn, kiel farus denaskulo

E2 Paroliga rondo

Alex Humet kaj Robert Weemeyer
salono Wittscheid
ĉiutage 10:35-12:00



Mallongigoj en la broŝuro:

E = esperantokurso	D = diservo
Pr = prelego	K = kurso
M = manlaboro	L = ludoj
G = sporto, danco	

Prelegoj

Pr1 Travivi en trompa reto

Wolfram Diestel
salono Giescheid
mardo 15.04. 09:10

Interreta trompado plimultiĝas de jaro al jaro. Ni diskutos kelkajn tipajn specojn de trompoj kaj manierojn eviti trompiĝi.
(prelego kun diskuto)

Pr2 Kion faras la profesio "Konservado kaj restaŭrado de arkeologiaj objektoj"?

Paula Weil
salono Giescheid
mardo 15.04. 10:35

Mi studas konservadon kaj restaŭradon de arkeologiaj objektoj. Estas eta kaj ne multe konata fako. La kombinaĵo de natur- kaj materialsciencoj, manlaboro kaj historio kreas tiun specifan sciencon de konservado kaj restaŭrado. La laboro ofte estas sufiĉe kaŝita en la laboratorioj, metiejoj aŭ kunfandiĝita malantaŭ la muzea ekspozicio. Tial mi volas iomete klarigi la laborkampon, tagajn taskojn, profesiajn principojn kaj kiel iĝi konservadisto kaj restaŭradisto de arkeologiaj objektoj.

Pr3 Kiam malaperis esperanto movado? Kia perspektivo nun?

Jerzy Leyk
salono Giescheid
merkredo 16.04. 10:35

Inter esperanto-parolantoj cirkulas la opinio, ke ekzistas t.n. esperanto movado. Tio certe estas historie motivita kredaro, sed ĉu plu trafa? Analizante la temon ne de interne sed de ekstere, laŭ sociologia vidpunkto, la nuna esperanto aktivado glob- kaj lokaskale ne formas aktuale reformisman socian movadon. Se post sia nasko esperanto aktivecoj havis reformismajn trajtojn, la demando temas: kiam ili praktike malaperis kaj kial?
La prezentado analizas tiujn fenomenojn en la kadro de kvar fazoj de idea, socia kaj organiza historio de esperanto komunumo – apenaŭ konsciataj en esperanto rondoj. Surbaze de tio sekvas konkludoj pri perspektivoj, eblaj efikpromesaj direktoj kaj formoj de e-aktivecoj en sekvaj jardekoj. Mi demonstras kaj eksplikas ankaŭ direktojn kaj kredojn kiuj oftas sed ne povas gvidi al sukcesoj.
Se esperanto aktivado ne plu formas reformisman socian movadon, do kian tipon de socia aktivado ĝi konsistigas? Kion tio signifas por aktivpretaj homoj?

Pr4 Menskalkulado - Radikoj

Klaus Rumrich
salono Giescheid
ĵaŭdo 17.04. 10:35

Kvadrata radiko el 64 estas 8, ĉar $64 = 8 \cdot 8 = 8^2$
Sed kio estas la kvadrata radiko el 417, do la tasko estas trovi x tiel ke $x^2 = x \cdot x = 417$?

Kiel kalkuli kvadratajn kaj kubajn radikojn?
Unue mi montros tre facilan metodon por kalkuli kubajn radikojn, tamen ĝi ne estas ĝenerale aplikebla.
Poste mi prezentos metodon por skribe kalkuli radikojn, kaj montros kiel oni povas modifi la metodon por kalkuli tion eĉ mense.
Per tiu metodo eblas mense kalkuli 4 ĝis 6 ciferojn de kvadrataj radikoj, se vi sufiĉe trejniĝas eĉ pli da ciferoj!

Prelegoj

Pr5 Parazitoj & ĉu ili rajtas ekzisti?
Marietta Haumer
salono Giescheid
vendredo 18.04. 09:10

Kial la mondo havas tiel multe da parazitojn. Ĉu formorto de parazitoj ne estus profite por ĉiuj organismoj.

Pr6 Hormonoj, superrigado.
Ite Tytgat
salono Giescheid
vendredo 18.04. 10:35

Koncize mi volas doni superrigardon de la hormonoj kiuj efikas en nia korpo. Unue mi klarigos kio estas hormono, kion ili faras en la korpo, kie kaj kiam ili estas produktitaj.

Pr7 KosmoPolitika Kooperativo, por profunde justa, daŭrigebla, demokratia kaj feliĉa socio
Laurent Zibell
salono Giescheid
sabate 19.04. 10:35

Antaŭ la malpliboniĝo de la medio, de la klimato kaj de la demokratio, 16 eŭropaj civitanoj fondis tuteŭropan KosmoPolitikan Kooperativon por subteni plurmaniere la estiĝon de positiva socia alternativo, nomita la Socio de Interkonsento, al la hodiaŭa situacio. La prelego prezentos mallonge (dum ĉirkaŭ 20 minutoj): (1) la plej gravajn ecojn de la profunde justa, daŭrigebla, demokratia kaj feliĉa Socio de Interkonsento, (2) la 4 ĉefajn agilojn de la KosmoPolitika Kooperativo: kiel asocio, kiel sindikato, kiel firmao kaj kiel politika organizo. Post la prezento, mi ĝojus diskuti (dum ĉirkaŭ 30 minutoj) kun la partoprenantoj pri ilia opinio pri tia iniciato. La retejo de la Kooperativo estas: https://www.cosmopolitical.coop/. Interesa eco de la KosmoPolitika Kooperativo estas, ke Esperanto estas unu (kun la angla) el ĝia du oficialaj lingvoj.

Gimnastikoj, Sportoj kaj Dancoj

G1 Jogo
David Henkel
salono Mischeid
ĉiutage 07:30

Jogo-gimnastiko en mateno por ĉiuj kiu ŝatas antaŭ manĝi esti veka sen kafo

G2 Ĵonglado
Klaus Rumrich
salono Mischeid
ĉiutage 09:00

Kurso por komencantoj kaj progresantoj. Ĉiu povas lerni ĵongladon!

G3 Zumba
Zoja Haŭmer
salono Mischeid
ĉiutage 10:35

Zumba estas konata sport-koncepto kun simple imiteblaj movoj el latinamerika kaj internacia
muziko! Do, moviĝu vin kaj havu ĝojon!

Gimnastikoj, Sportoj kaj Dancoj

G4 Popoldancado
Detlef Meier
salono Mischeid
sabato 19.04. 09:10
sabato 19.04. 19:00
dimanĉe post la ovoserĉado

Ni dancas popoldancojn el germanlingvaj regionoj. Inter ili estas dancoj sen partnero, paraj dancoj, duparaj dancoj. Eblas ankaŭ kvarparaj dancoj al kiuj apartenas metiistaj dancoj kiel la dancoj de muelisto, tajloro kaj potfaristo. Kelkajn parajn
dancojn oni dancas kun la sama partnero, ĉe aliaj oni ricevas en ĉiu ripeto alian partneron. Invititaj estas personoj sen sperto pri dancado, kiuj volas ekscii iradon kun muziko kaj ankaŭ personoj kun sperto pri dancado.





Kursoj

K1 Ŝtofkolorigado
Georg Weil
Ĉiutage ek de 09:15
ekstere

Per ŝablonoj ni kune kolorigos saketojn, T-ĉemizojn ktp.

K2 Origamio
Zoja Haumer
salono Dickerscheid
mardo 15.04. 09:00
ĵaŭdo 17.04. 09:00

Ni praktikos fascinan paperfaldadon de diversaj belaj ensorĉantaj objektoj.

K3 Muzika rondo
Uli Diestel
salono Zingscheid
ĉiutage 09:00

ekzerci kelkajn tre facilajn pecojn el diversaj regionoj de la mondo kaj diversaj tempoj.
(Kunportu propran muzikilon aŭ pruntepreno fluton aŭ ukulelon)

K4 Poŝtranĉila diplomo
Tobias Menzel
merkredo 16.04. 09:10
ekstere

lernu kiel bone kaj sekure uzi vian poŝtranĉilon. Spertulo Tobias enkondukas vin al la arto de tranĉado. Bonvenaj estas infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj

K5 Malferma manlabora rondo
Carolin Weemeyer
salono Wittscheid
mardo 15.04. 19:00
ĵaŭdo 17.04. 19:00

Ĉu vi ŝatas triki, kroĉeti, brodi aŭ fari alian manlaboron? Simple venu al nia rondo kaj manlaboru kun ni. Dume ni povos babili pri kio ajn ĉeestantoj volas. Bv. kunporti viajn proprajn materialojn.

Ludoj

L1 Nigraj rakontoj
Carolin Weemeyer
salono Wittscheid
merkredo 16.04. 19:00

Mi rakontas fragmentojn pri vere okazintaj krimoj, mortoj aŭ simile, kaj la ĉeestantoj provu pere de nur ĉu-demandoj diveni kio fakte okazis.
Venu kaj helpu solvi enigmojn!
Ne taŭgas por etaj infanoj.

L2 Next Station London
Carolin Weemeyer
salono Zingscheid
ĵaŭdo 17.04. 10:35

Vi estas planisto por la sekva Londona metrosistemo. Malgraŭ estos kelkaj obstakloj, vi konektu multajn staciojn en Londono per la kvar metrolinioj, kiujn vi rajtas plani. Tiu kun la plej multaj poentoj venkos!

L3 Ludposttagmezo
Verdaj Skoltoj
salono Zingscheid
dimanĉo 20.04. 14:30

Por ĉiu aĝo

L4 Ekskursio pri la insektoj
Verdaj Skoltoj
ekstere
mardo 15.04. 10:35

L5 Ekskursio pri la arboj
Verdaj Skoltoj
ekstere
sabate 19.04. 10:35

L6 Nokta ekskursio pri la steloj
Verdaj Skoltoj
ekstere
sabate 19.04. ca 21:00



Infana programo ne nur por infanoj

Mazi-horo
Nicky Janssen
salono Kaminzimmer
ĉiutage 09:15

Matene kutime okazas Mazi-horo: kurso por infanoj laŭ la Mazi-metodo. La infanoj spektas lecionojn de la Mazi-filmo kaj lude ekzercas la lernitaĵojn.
Lerni saluti kaj respondi, bestnomojn, kalkuli, ĉiutagajn aĵojn.

Pîĵamaj rakontoj
Nicky Janssen
salono Kaminzimmer
ĉiutage 19:00

En la antaŭvespera programo okazas rakontoj por la etuloj, kiuj devas enlitiĝi kaj dormi frue. Sed atentu, estas veraj pîĵamaj rakontoj: oni rajtas aŭskulti nur en dormvestoj!

M1 **Arta Manlaboro**
Nicky Janssen
salono Dickerscheid
ĉiutage 10:45

Paskaj kaj printempaj manlaboroj por infanoj kaj plenkreskuloj.
Ornamaĵfarado (floroj, printempaj bestoj, tablo-ornamĵoj ktp)
moveblaj memfaradoj (mirinde simplaj)

Kaj aliaj proponoj:

- Stafetoj, moviĝu!!!
- Teatraĵeto (por prezenti ĉe la internacia vespero)
- Ĉiam truŝtopilo (ekz.por ne eks-kursanoj ktp)

Nicky Janssen
vidu ĉiutagajn anoncojn ĉe la salonpordo

Paska Ovoserĉado
Zoja, Nicky, Chris-toph kaj aliaj leporoj
komenco kaj fino en la granda salono Zingscheid
dimanĉo 20.04. 09:20

Je la paska dimanĉo, tuj post la maten-manĝo, okazos granda serĉado de paskaj ovoj (kaj dolĉaĵoj) por infanoj. La paska leporo kaŝos tiujn paskaĵojn.

Ĉokoladaj bananoj
Verdaj skoltoj
ekstere
sabato 30.03. 15:00

M2 **Labirintoj sur papero kaj per LEGO**
Uli Diestel
salono Zingscheid
merkredo 16.04. 10:35

Lernu inventi kaj desegni proprajn labirin-tojn kaj konstruu labirintojn per Lego-ŝtonojn

M3 **Akvarel-desegnado**
Uli Diestel
salono Zingscheid
vendredo 16.04. 10:35

kreu printempan florbedon per akvarela farbo. Tre simpla, taŭgas por infanoj ek de 6/7 jaroj kaj plenkreskuloj

Diservoj

D1 Matena kaj vespera Laŭdo

Georg Weil
salono Wittscheid
mardo 07:30
merkredo 07:30
ĵaŭdo 07:30
vendredo 19:00
sabato 19:00

Karaj kantistoj!
Jam de multaj jaroj ekzistas fiksita programpunkto ĉe PSI:
La Matena Laŭdo!
Matena Laŭdo estas antaŭ matenmanĝo je 7:30 a.m.
Ni kantas kantojn el la libro Adoru.
Ĉi tiuj estas ĉefe kristanaj kantoj.
Sed ni ankaŭ kantas sekularajn kantojn.
Bonvolu alporti viajn plej ŝatatajn kantojn!
Unu celo estas kanti kanton ĉe la paska nokta diservo en la preĝejo en Hellenthal.
Tiamaniere ni jam konatigis Esperanton al multaj homoj en multaj lokoj, kie okazis la PSI.

D2 Paska diservo en la preĝejo

Georg Weil
foriro al diservo
dimanĉo 04:00
M5 05:00 diservo
en la preĝejo

En Hellenthal la Paska nokta diservo okazos Paskan dimanĉon je la 5-a horo, frumatene.
Ni ekiros je la 4-a, kaj post tri kvaronhora promenado ni atingos la preĝejon
Ĉi tio estos bela nokta promenado!
Por la reveno ni povas preni la publikan buson.

Se necese, ni povas ankaŭ preni taksion al la preĝejo.

Ekskursoj en Hellenthal

La regiono de la ĉi-jara PSI estas tre alloga regiono kun abundaj eblecoj de ennaturaj ekskursoj. Vi bone povus bicikli.

E-bicikloj estas haveblaj en la turista oficejo por 35 € tage.

Hellenthal valoras vojaĝon en ajna tempo de la jaro. Printempe, de la fino de marto ĝis la komenco de majo, vi povas observi specialan naturan spektaklon proksime en la regiono Eifel: tiam milionoj da sovaĝkreskantaj "flavaj narcisoj" floras en la herbejaj valoj de la supra Oleftal kaj transformas la pejzaĝon en flavan maron de floroj. La digoj Olef, Rur kaj Urftsee ofertas mirindajn vidojn; Multnombraj migraj vojoj kiel la **sovaĝeja pado/vojeto** kaj la Eifelsteig invitas vin marŝi. Ĉu vi preferas esplori la naturon sur du radoj? Vi povas lui biciklojn, montbiciklojn kaj E-biciklojn de la propra bicikloluejo de la komunumo. La longdistanca bicikla vojo Eifelhöhenroute kondukas rekte preter la junulargastejo.

La kulminaĵo de la areo kaj precipe populara ĉe familioj estas la Hellenthal sovaĝbesta rezervejo (distanco 4,3km) kun sia fama rabobirdospektaklo. Kiu kuraĝas teni realan aglon en siaj brakoj? Estas ankaŭ kaproj, ŝafoj, azenoj kaj aliaj bestoj por ke la etuloj tuŝu.

La turismaj urboj Bad Münstereifel kaj Monschau havas belegajn urbcentrojn kun kastelo, muzeo kaj multe da kafejoj kaj vendejoj. Bad Münstereifel estas konata kiel „Outletcity“.

Ni preparis por la ĉi-jara PSI denove ampleksan kaj diversan ekskursan programon. Dum ĉiu posttagmezo okazos diverskarakteraj ekskursoj:

Ni ĉiam renkontiĝos ekstere antaŭ la enirejo de la junulara gastejo por iri al la bushaltejo. Por atingi la ekskursocelojn vi krome povas piediri, bicikli aŭ uzi la aŭton.

• Ekskursoj per publikaj trafikiloj (**nomitaj Px, x=cifero**) al la urbocentro Hellenthal aŭ al Ardenner Centro funkcias nur per alvoktaksio (vi devas antaŭanonci ĝin telefone ĉe MiKE (Tel. 02441 99 45 45 45) duonon horon antaŭe, por grupo kun pli ok 5 kunvojanĝontoj 3 tagoj antaŭe). La bushaltejoj estas 5-10 minutojn for de la gastejo.
La tuttaga ekskurso al Vogelsang povas okazi per publikaj busoj.

• **Migradoj (nomitaj Mx, x=cifero)** - piedaj ekskursoj tra la naturo.

• Kiel dum la pasintaj PSI-oj la pli longajn ekskursojn kaj la ekskursojn dum festtagoj ni aranĝas per **privataj aŭtomobiloj (nomitaj Ax, x=cifero)** de la partoprenantoj.

Mallongigoj:
D = distanco, **E** = ekiro, **B** = buso **R** = reveturo

Ni volonte informos vin pri alternativoj, kiujn vi meminiciate povas entrepreni.

Aparte ni rekomendas:

A 10	Hallenbad (Naĝejo malgranda) Vogelsang: D: 20 km 26min. https://www.schwimmbadvogelsang.de/%C3%B6ffnungszeiten-preise
A 11	Grube Wohlfahrt (fosejo) D: 11km 11 min. https://de.wikipedia.org/wiki/Grube_Wohlfahrt_(Bergwerk)
A 12	Kastelo Burg Wildenburg D: 8,6 km 10 min. https://de.wikipedia.org/wiki/Burg_Wildenburg_(Eifel)
A 13	Salvatorianerkloster Steinfeld D:16 km 16 min https://de.wikipedia.org/wiki/Kloster_Steinfeld



Mardo, 15-a de aprilo 2025

P1 Ardenner Centro apud la belga landlimo

Ardenner Center, Hellenthal - Losheim

13:45 Ekiro al la bushaltejo; buso forvetu-ros 14:02 kaj alvenos en Ardenner Cen-tro14:44
R: 17:10 – 17:53
D: 19 km

Kie iam malgrandaj kaj grandaj kontrabandi-stoj timis esti kaptitaj fare de doganistoj nun estas la Ardennes Cultur Boule-vard - ĝojo por la sensoj. Rekte ĉe la german-belga landlimo, ĉe la B 265 kaj B 421, vi trovos la Ardennes Cultur Bulvardon, miksaĵon de mirindaj ekspozicioj kaj diversaj aĉeteblecoj. Ĉi tio faras la Ardena Kulturbulvardo cellokon por la tuta familio, en ĉiu sezono, kun butikoj malfermitaj dimanĉe kaj dum festotagoj.

- **La ArsKRIPPANA** montras kripojn el la tuta mondo.
- **ArsFIGURA** kondukas vin tra la glora imperia epoko kun unika pupkolekto.

La enirprezo por ambaŭ muzeoj estas 9,50 € / 5,00 €

- **La ArsTECNICA** modelfervoja kolekto plirapidigas la korojn de modelfervoj-entuziasmuloj.
- **La ekspozicio OldHISTORIES** rakontas postmilitajn historiojn pri kontrabandado, ŝtelĉasado kaj rekonstruado en la Ejfel.

La enirprezo por ambaŭ muzeoj **ArsTECNICA kaj OldHISTORIES** estas 8,00 € / 4,00 €

- Esploru la diversecon de la **limmerkato de Ardenoj AD Delhaize**

Malkovru belgajn specialaĵojn kiel ĉokoladojn, abatajn bierojn, la faman Ardenan ŝinkon kaj plej bonajn francajn vinojn kaj nian grandan elekton de kafo je malaltaj prezoj.

Post butikumado, ni rekomendas refreŝiĝon **en la bistro OldSMUGGLER –** ĉi tie vi povas ĝui la bongustan belgan rizkukspecialaĵon!

- Malstreĉiĝu kaj promenu tra la specialaj butikoj:
  ArsMINERALIS, tie vi povas sperti kaj malkovri grandan elekton de mineraloj, gemoj, fosilioj, juvelaĵoj, naturaj kuraciloj, naturaj kosmetikaĵoj, donacaj ideoj kaj artaj kaj dezajnitaj pecoj.
  ArsTECNICA, tie vi trovos ĉion por via modelfervojo kaj modelkon-struaĵo kaj ampleksan gamon de miniaturaj modeloj kaj vapormaŝinoj, same kiel ludilojn, pupojn kaj molajn ludilojn.

M1 E: 14:00 Sovaĝobestoparko kaj rabobirdostacio kun sia fama **rabobirdospektaklo en Hellenthal**

D: 4,3 km, piede vi bezonas 60 min.
Depende de la vetero povus okazi alian tagon.
https://www.greifvogelstation-hellenthal.de/

P2 Eblas veturi per publika alvoktaksio.
E: 13:40 **B:** 13:53 - 13:55 + 25 min piede
R: 17:36 - 18:02
A2 E: 14:15

Grupprezoj (ek de 15 personoj)	
Plenkreskuloj	11,00 €
Lernantoj ek de15 jaroj	10,00 €
Infanoj (3 - 14 jaroj)	9,00 €
Familia bileto (enhavas du infanoj)	40,00 €

La bestoparko estas 65-hektara granda kaj impona rabobirdo-stacion. Tie vi povas observi multajn arbarajn loĝantojn de proksime. En la unika rabobirdo spektaklo, agloj, strigoj kaj falkoj rondiras super via kapo dum vi lernas multon pri ilia konduto: kiel bone aŭdas strigoj, kiom rapide estas falkoj kaj kiom alte flugas agloj? La helentala rabobirdo-stacio en la koro de Eifel estas verŝajne unu el la plej malnovaj kaj plej grandaj instalaĵoj de sia speco en Mezeŭropo. De la pugnogranda pigmeostrigo ĝis la giganta anda kondoro kun trimetra flugildistanco, multaj malsamaj specioj de rabobirdoj kaj strigoj havas sian hejmon tie. La bestoj estas prezentitaj en libera flugo plurfoje tage je certaj tempoj, kio estas la plej bona maniero sperti ĉi tiujn admirindajn kaj majestajn birdojn de proksime. Krom publikaj rilatoj kaj edukado, multe okazas ankaŭ malantaŭ la kulisoj por protekti naturon kaj speciojn. Malsanaj, vunditaj kaj orfitaj bestoj estas flegitaj reen al sano sub veterinara prizorgo kaj liberigitaj reen en la sovaĝejon. Vi povas vidi ruĝajn cervojn, damojn, aprojn, muflonojn, linkojn, vulpojn, sovaĝajn katojn, lavursojn, mustelhundojn kaj sovaĝajn ĉevalojn.

Eblas veturi senkoste per trajneto ek de la enirejo tra la parko je 15:30, se estas sufiĉe da homoj (minimume10). Ekzistas karesoĝardeno kun kaproj, ŝafoj, azenoj kaj alpakoj kaj aliaj bestoj.

Ankaŭ **ekzistas ludejo** en la bestoparko kaj apude de la ludejo estas kafejo.

Merkredo, 16-a de aprilo 2025

Tuttaga ekskurso al Vogelsang

https://de.wikipedia.org/wiki/NS-Ordensburg_Vogelsang

P3 E: 9:30 **B: 9:53 – 13:52**
R: 17:03- 18:02
A3 E: 10:20

La tielnomita **NS-Ordensburg Vogelsang** estas konstruaĵkomplekso konstruita de la nacisocialistoj en la Ejfel super la Urft Digo sur la Erpenscheid monto proksime de Schleiden-Gemünd en Nordrejn-Vestfalio. Kontraste al la SS-Junkerschule kaj la Reichsführerschule, la NSDAP uzis la instalaĵon inter 1936 kaj 1939 kiel trejnadinstalaĵo por la venonta generacio de la NSDAP gvidadkadro.

La parto de la konstruaĵoj, kiuj estas sub monumentprotektado, havas areon de pli ol 50 000 kvadrataj metroj kaj estas konsiderata kiel la plej granda pluviva ekzemplo de nacisocialisma arkitekturo en Germanio post la partiaj kongresaj konstruaĵoj en Nurenbergo kun preskaŭ 100 hektaroj da konstruita areo.

Post la Dua Mondmilito, la komplekso estis transprenita de britaj trupoj, kiuj starigis la milittrejnan areon en la ĉirkaŭaĵo de 6 354 hektaroj. En 1950, la infrastrukturo estis transprenita de belgaj militfortoj, kiuj starigis kazernon tie sub la nomo "Camp Vogelsang" kaj uzis kaj administris ĝin kaj la milittrejnan areon ĝis 2005. La konstruaĵoj estis listigitaj kiel historiaj monumentoj ekde 1989.

En 2016 Vogelsang iĝis nazia dokumenta centro kiel parto de permanenta ekspozicio kaj kiel arkitektura memorejo. La ekspocio klarigas la danĝeron de nacia socialismo kaj milito.

Ek de septembro 2016 estas loko por konstantaj ekspozicioj:

- Ekspozicio “Naziaj ordenaj kasteloj inter faŝismo kaj krimo” malfermiĝis. Ĝi prezentas la historion de la nazia ordena kastelo (Ordensburg), ligita al aliaj temoj de la nazia epoko, sur areo de 800 m².
- Granda nacia parka ekspozicio same kiel kromaj provizoraj ekspozicioj en la kelaj ĉambroj de la Teŭtona Kastelo informas vizitantojn.

Oni povas grimpi sur la 48m altan turon kaj havas bonan superrigardon.

Eblas partopreni gvidadon **tra la kamparo** je 14:00.

Daŭro: 90 minutojn

Prezo: por plenkreskulo 9,50 €
por junuloj ek de 13 jaroj 7,50 €

La **gvidado tra la ekspocio** pri la ordena kastelo daŭras 90 minutojn

Prezo: 13,00 € po persono (minimuma grupo = 10 personoj)

La **enirprezoj por la ordena muzeo**:
Prezo: 9,50 € por plenkreskulo,
5,50 € por junuloj ek de 12 jaroj.
20,00 € por la Familio

La granda aventurekspozicio "Wildnis (t)räume" de la Naciparka Centro Eifel estas 2000 m² de fascino por junuloj kaj maljunuloj.

La nacia parko-filozofio "Lasu la naturon esti la naturo" estas la ĉefa temo de la ekspozicio. Atendokaptaj perspektivŝanĝoj kaj surprizaj efikoj atendas vin akompanante la naturon.

La **enirprezoj** por la **nacia parka ekspozicio “Wildnis(t)räume“**
8,00 € / 4,00 €, familia bileto: 18,00 €. Senpage sub 7 jaroj.

M2 E: 12:45 **Migrado tra kampoj de narcisoj en Hollerath/**
D: 5 km (piede 80min.)
P4 eblas veturi per alvoktaksio
E: 12:45 **B:** 13:02 – 13:11 buso 839 al Hollerath Hof + pieden 300 m al parkejo „Hollerather Knie“)
A4 E: 13:30 Hollerath parkejo

La gvidado komencos je 14:00 kaj daŭras 1h 30 por 6 km.

Prezo: plenkreskuloj 5,00 €, infanoj (10-17 jaroj) 3,00 €

https://www.hellenthal.de/freizeit-tourismus/veranstaltungen/gefuehrte-wanderungen-zu-den-narzissen





Ĵaŭdo la 17-a de aprilo 2025

A5 13.00: Bad Münstereifel
D: 40 km / 40 Min.

Bad Münstereifel estas urbo en la distrikto de Euskirchen en la sudo de Nordrejn-Vestfalio. Ĝi estas konsiderata kiel mezepoka urbo kun preskaŭ tute konservita kaj rekonstruita urbomuro kun kvar turoj.

La urbo estas la unua, en kiu oni konstruis tiel nomatan rektvendejon (Outletcity) en urbocentro. Krome, ene de la urbomuroj, laŭ la piediranta zono, multaj butikoj situas en konstruaĵoj de la historia malnova urbo.

Eblus fari gvidadon je 14:00 tra la urbo ek de la Orchheimer turo.
Prezo: 5,00 € po persono.

Meze de julio 2021 pluraj partoj de la grandurbo estis trafitaj per severa inundado. Nuntempe multe da domoj estas renovigitaj.

M3 E: 14:00 Oleftalsperre **(valbarilo) Oleftal**
D: 3,7 km 50 min.
https://de.wikipedia.org/wiki/Oleftalsperre

Vendredo la 18-a de aprilo 2025

A6 E: 13:00 **Ŝipveturado sur Rurtalsee (lago de akvabarilo)**
D: 26,5 km 30 min.
https://www.rursee-schifffahrt.de/rundfahrten/

Veturado de 14:00 – 16:45
paŭzo por kafumi aŭ promeni
inter 14:45- 16:00

Ni startos en Schwammenauel
kaj veturos al Rurberg.
La prezo estas 14,00 € po persono.
Familioj pagas 35,50 €
Gruprabato estas havebla
ek de 10 personoj
(10 procentoj, se oni antaŭe aliĝas.)

Sabato, 19-a de aprilo 2025

A7 E: 13:00 **Monschau**
D: 24 km 25 min.

Monschau estas unu el la plej belaj lokoj en Germanio. Monschau estas bela urbo en Eifel, Nordrejn-Vestfalio. Ĝi estas ofte vizitata pro sia romantika urba medio kun sia historia kastelo kaj la bela ĉirkaŭaĵo en la Nacia Parko Eifel.
https://www.monschau.de/tourismus/sehenswuerdigkeiten/

Vi povas veturi per trajneto de la merkato 14:40 kaj 15:30 tra la urbo al la kastelo.

Prezoj: plenkreskulo 9,00 €,
Lernantoj kaj studentoj 5,00 €,
familia bileto 20,00 €.

Dimanĉo, 20-a de aprilo 2025

A8/ M4 E: 4:00 (frumatene!)
5:00 Paska diservo en la
protestanta preĝejo Hellenthal
Im Kirschseiffen 27
D: 2,5 km

M5 E: 13:00 pieden
A9 E: 14:00 per aŭto al la **Kastelo Reifferscheidt**
D: 4 km / 60 min. piede
https://de.wikipedia.org/wiki/Burg_Reifferscheid
En la kastelo estas **kafejo**

Ĝi estas malfermita sabate kaj dimanĉe
11:00 – 17:00

Vespera programo
salono Zingscheid



Lundo 14.04.	Enkonduko kaj interkona vespero
Mardo 15.04.	Teama Lud-Dekatlono
Merkredo 16.04.	Koncerto de Kaŝi
Ĵaŭdo 17.04.	Kokino Henjo pupteatraĵo de Christoph Frank
Vendredo 18.04.	Balo Nia ĉi-jara balo havas temon „danco sur vulkano“ Venu danci kaj amuziĝi
Sabato 19.04.	Paska fajro ekstere, kun bastonpano kaj kantado paska nokta diservo
Dimanĉo 20.04.	Internacia vespero Kun kontribuoj de ĉiuj Anoncu vian prezentadon al Ralf Haŭmer



Kokino Henjo

Pupteatraĵo

Christoph Frank prezentos magian-muzikan pupteatraĵon pri la kokino Henjo, kiu subite ne plu povas demeti ovojn. Postkiam ŝi petis helpon de la „magiisto por ĉiuj kazoj“, sekvas amuzaj kaj frenezaj okazaĵoj.

Foto de http://www.zauberbuehne.de/

Teama Lud-Dekatlono

En ĉi tiu dekatlono, ĉiu du-persona teamo ricevas la samajn dek lud-taskojn.
Povas kunludi duopoj kiel teamoj (eble ankaŭ triopoj? - en tiu okazo en kelkaj ludoj nur du el ili povas kunludi). Estas dek stacioj kun taskoj, kaj temas pri koncentrado, lerteco, rapideco.
Ĝi taŭgas kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. En ĉiu tasko la plej bona teamo ricevas 100 poentojn, la aliaj teamoj ricevas kalkulitajn poentojn.
Ekz. se alia teamo atingas nur 90% da sukcesaj provoj kompare al la plej bona teamo, ĝi ricevas 90 poentojn.

Kaŝi

En 2014 li unuafoje koncertis en Esperantujo: tio okazis en Somera Esperanto-Studado (Slovakio); sekvis pliaj koncertoj en kongresoj kaj renkontiĝoj en Germanio kaj alilande, inkluzive de la 101a Universala Kongreso en Nitro (Slovakio). En Varsovio kaj Vroclavo (Pollando) li kantis kun Ĝojo. En siaj koncertoj li kutime kantas Esperante, angle kaj hispane.

(Teksto kaj foto de https://sezonoj.ru/2018/11/bet-67/)